# Kio estas kia?

**Kia estas objekto?** Objekto estas, (nu...) senviva. **Kia estas vegetaĵo?** **Kia estas animalo?** Kia estas besto? Kia estas homo? Kiaj estas aferoj? Kiaj estas personoj? Kia estas vi? Kiaj estas vi? Kia estas via najbaro? Kia estas via proksimulo? Kia estas tiu viro? Kia estas tiu sinjoro? Kia estas tiu sinjorino? Kia estas tiu virino? Kia estas tiu junulino? Kia estas tiu ino? Kia estas tiu knabino? Kia estas la vivo? Kia estas la sorto? Kio estas kia? – jen demandoj.

**Objekto estas senviva**. **Vegetaĵoj, animaloj estas vivaj**. Mi estas gaja, forta, saĝa, inteligenta, bela kaj modesta. Nun ĉiu el ni estas laca. Mia najbaro, cetere, estas simpatia, alta kaj dika. Mia proksimulo estas aminda. Leono estas forta. Leono estas flava. Sablo estas – flava. Porkido estas rozokolora aŭ rozkolora. Ankaŭ suĉinfanoj povas esti rozokoloraj. Pasero estas griza. Pasero estas griza birdo. Ankaŭ muso estas griza. Ankaŭ polvo estas griza. Kelkfoje ankaŭ la vivo ŝajnas (esti) griza, senkolora. Aŭtune, kiam pluvas, kiam la suno ne brilas, ankaŭ la vetero ŝajnas griza. Kampa papavo estas ruĝa. Ankaŭ herbotigo estas verda. Ankaŭ piro estas verda aŭ flava. Nematura pomo estas verda. Ankaŭ nematura pruno estas verda. Printempe ĉio estas verda. Ĉerizoj estas ruĝaj. Tiuj pomoj estas ruĝaj. Akvomelono – ekstere – estas verda. Akvomelono – interne – estas ruĝa. Arbara urso estas bruna. Polusa urso estas blanka. Sango estas ruĝa. Tulipo povas esti ruĝa. Tulipo povas esti ankaŭ flava. La Esperanta stelo estas verda. Hungara flago estas ruĝa–blanka–verda. Nia ŝranko estas bruna. Argilo estas flava aŭ bruna. Arbofolio estas verda. Abio estas verda. Tiu lago estas mezgranda. La printempo estas bela. La nuna somero estas varma. La pasinta somero estis varmega. Somere la arboj estas verdaj. La vetero nun estas bela. La ĉielo nun estas blua. Kiam la ĉielo estas blua, ankaŭ la lago estas blua. La humo estas nigra. En nigra humo legomoj evoluas bone. La kolumo de la ĉemizo de Jozefo estas griza. Ankaŭ la okuloj de Jozefo estas grizaj. Elefanto estas pli granda ol muso, evidente. Somero estas pli varma ol printempo. Printempo estas pli varma ol vintro.

Kia estas leono? Kia estas kampa papavo? Kia estas herbotigo? Kiun koloron havas akvomelono? Kia estas la lago, kiam la ĉielo estas blua? Kia ŝajnas esti as la vetero, kiam pluvas? Kia estas nematura pruno? Kiaj estas ĉerizoj? Kia estas akvomelono interne? Kia estas akvomelono ekstere? Kia estas fiziko? Kia estas matematiko? Kia estas ĥemio? Kia estas matematiko?

Kiam, **en kiu tempo**, en kiu parto de la tago estas plej varme? – Tagmeze.

Kiam, en kiu tempo, en kiu parto de la tagnokto estas plej malvarme? – Noktomeze.

Kiam vi manĝas la unuan fojon en la tago? – Matene.

Kiam vi manĝas la duan fojon en la tago? – Tagmeze.

Kiam vi manĝas la trian fojon en la tago? – Je la kvina horo posttagmeze.

Kiam vi manĝas la kvaran fojon en la tago? – La kvaran fojon mi manĝas ĉirkaŭ la naŭa horo vespere.

**<u>VORTARO</u>** Skribu simplan frazon kun tiu Esperanta vorto (ekz. simplan demandon pri ĝi)

**objekto** (kio?) ________________________________________

lernobjekto, lernofako (kio?) ________________________________________

lernofako, fako (kio?) ________________________________________

**vegetaĵo**, kreskaĵo (kio? ________________________________________

**animalo** (kio?) ) ________________________________________

**afero** (kio?) ________________________________________

**senviva** (kia?) ________________________________________

**besto** (kio?) ________________________________________

**birdo** (kio?) ________________________________________

mambesto (kio?) ________________________________________

**fiŝo** (kio?) ________________________________________

**viva**, vivanta (kia?) ________________________________________

**gaja** (kia?) ________________________________________

**forta** (kia?) ________________________________________

**inteligenta** (kia?) ______________________________

**modesta** (kia?) ______________________________

**alta** (kia?) ______________________________

**dika** (kia?) ______________________________

**homo** (kio?, kiu?) ______________________________

**najbaro** (kiu?) ______________________________

proksimulo (kiu?) ______________________________

**aminda** (kia?) ______________________________

viro (kiu?) ______________________________

**virino** (kiu?) ______________________________

**sinjoro** (kiu) ______________________________

**sinjorino** (kiu?) ______________________________

ino (kiu?) ______________________________

leono (kio?) ______________________________

flava (kia? kiukolora?) ______________________________

pasero (kio?) ______________________________

Kiun koloron (ĝi) havas? ______________________________

Kiukolora (ĝi) estas? ______________________________

porkido (kio? ) ______________________________

roz(o)kolora (kia? kiukolora?) ______________________________

roz(o)koloraj (kiaj?) ______________________________

suĉinfano (kiu?) ______________________________

bebo (kiu?) ______________________________

matura (kia?) ______________________________

tre matura (kia?) ______________________________________

nematura (kia?) ______________________________________

papavo (kio?) ______________________________________

kampa papavo ______________________________________

ruĝa (kia?) ______________________________________

pomo (kio?) ______________________________________

verda (kia?) ______________________________________

pomoj (kio?) ______________________________________

du kilogramoj da pomoj ______________________________________

herbotigo (kio?) ______________________________________

akvomelono ______________________________________

ekstere ______________________________________

interne ______________________________________

pruno ______________________________________

du kilomgramoj da prunoj ______________________________________

akvomelono (kio?) ______________________________________

lago (kio?) ______________________________________

blua (kia?) ______________________________________

mezgranda ______________________________________

humo (kio?) ______________________________________

nigra (kia?) ______________________________________

en kiu tempo ______________________________________

tagmeze (kiam?) ______________________________________

noktomeze (kiam?) ______________________________________